

La eksterordinara familio Roerich

Miaj du antaŭaj artikoloj pritraktis Alexandra David-Néel, Helena P. Blavatsky kaj Henry S. Olcott. Kion ili havas komunan kun la rusa familio Roerich?

Almenaŭ: Spiritan serĉadon, Tibeton, Teozofian Societon kaj aventurecajn vojaĝojn.

Antaŭ ol paroli pri la vojaĝoj de la familio Roerich, mi resumas tre mallonge ilian vivon antaŭ tiuj vojaĝoj.

Nikolao Roerich naskiĝis en 1874 en Sankt-Peterburgo. Lian familion vizitadis verkistoj, belartistoj kaj sciencistoj. Li mem, kiam li estis ankoraŭ infano, interesiĝis pri artoj (precipe pentrarto kaj arkitekturo) kaj sciencoj (ĉefe arkeologio). Siajn superajn studojn li faris en la Akademio de Artoj kaj – nur pro postulo de sia patro – en Jura Fakultato. En 1895, kiam li estis 21-jaraĝa, li ekkonis la gravajn rusajn komponistojn Musorgskij, Rimskij-Korsakov kaj Stravinski, kaj komencis ŝategi la klasikan muzikon. (Cetere li poste desegnis la scenajn dekoraciojn de pluraj operoj kaj baletoj, inkluzive la faman *Le Sacre du Printemps* de Stravinski.) De 1899 ĝis 1901 li vojaĝis tra Eŭropo por viziti gravajn muzeojn kaj artajn centrojn, precipe en Berlino kaj Parizo (kie li restis dum unu jaro). Reveninte hejme, li edziĝis kun Helena Ŝapoŝnikova (kiun li estis ekkoninta du jarojn antaŭe).

Helena Roerich – kiel ŝi nomiĝis post la edziniĝo – naskiĝis en 1879 en tre kultura familio. Ŝia patro estis konata arkitekto, kaj unu onklo estis la komponisto Musorgskij. Tre frue ŝi havis eksternormajn talentojn (je la aĝo de 7 jaroj ŝi jam scipovis legi kaj skribi en tri lingvoj, ŝi bone ludis pianon), kaj ŝi legis librojn pri arto, historio, filozofio kaj spiritaj aferoj. Ŝi ricevis bonan muzikan edukon, sed ŝiaj gepatroj ne permesis, ke ŝi vizitadu konservatorion. Estante ankoraŭ adoleskantino, ŝi interesiĝis pri orientaj religioj.

Nikolao kaj Helena geedziĝis en 1901, kaj en 1902 kaj 1904 naskiĝis iliaj filoj, Juri (poste li nomiĝis George) kaj Svetoslav. Ili ricevis bonegan edukon kaj ekhavis multajn interesajn spertojn dum la vojaĝoj kun siaj gepatroj.

Juri studis lingvojn kaj historion, krome militan sciencon. Je la aĝo de 20 jaroj li jam parolis 20 lingvojn kaj povis komunikiĝi en pliaj 12. Li iĝis fama orientalistoj, precipe tibetologo.

Svetoslav studis pentrarto kaj arkitekturo. Kiam li estis 19-jaraĝa, li jam iĝis direktoro de Internacia Arta Centro en Novjorko, kaj tri jarojn poste okazis en Filadelfio ekspozicio de ne malpli ol 200 liaj pentraĵoj. Dum sia longa vivo (li mortis je la aĝo de 88 jaroj) li pentris multajn pentraĵojn, faris multe por la kulturo ĝenerale kaj ricevis multajn distingajn.

En 1914 Nikolao kaj Helena legis librojn de la hinda – kaj hindua – filozofo Vivekananda, kiu ege influis ilian penson. En 1916 la familio transloĝiĝis al Finnlando, poste al Svedio kaj al Anglio. Tie ili ekkonis en 1920 la hindan poeton Rabindranath Tagore, kiu iĝis granda amiko de Nikolao, kaj ili membriĝis en la Teozofia Societo. La saman jaron ili transloĝiĝis al Usono, kie Nikolao pentris multe kaj fondis Instituton de Unuiĝintaj Artoj, Internacian Asocion de Pentristoj kaj Internacian Centron de Arto.

En 1923 Nikolao, Helena kaj Juri vojaĝis al Hindio (dum la alia filo, Svetoslav, restis en Usono, i.a. por zorgi pri la aferoj de sia patro). La triopo vizitis multajn kulturajn kaj religiajn centrojn kaj renkontiĝis kun multaj gravaj hindoj, en la kampoj de arto, scienco kaj religio. Ili volis ankaŭ eniri Tibeton, sed ne sukcesis. Ricevinte de la usona registaro permeson fari ekspedicion tra Centra Azio sub la usona flago, ili organizis tian ekspedicion, en kiu partoprenis pluraj homoj, sed nur la triopo la tutan tempon. Ili komencis ĝin en Kaŝmiro (nordokcidenta Hindio) en marto de 1925.

Estis dirite, ke en la tuta historio de la homaro neniu alia faris tiel grandiozan sciencajn ekspedicion tra Centra Azio (http://agniyoga888.ru/ur888/family/8_expedition.htm). La grupo faris esplorojn en la kampoj de geografio, historio, arkeologio, etnografio, artoj kaj religioj. I.a. ili trovis rarajn manuskriptojn kaj kolektis riĉan lingvistikan materialon.

La karavano transpasis la Himalajon en norda direkto, iris ĝis Omsk en Rusio (de kie ĝi iris al Moskvo kaj kien ĝi revenis), transpasis la montaron Altaĵo kaj Mongolion (inkluzive la dezerton Gobi) kaj revenis tra la orienta Himalajo al norda Hindio. La familio Roerich ankaŭ provis trovi la mitan Ŝambalon (aŭ Ŝambalaon): “Ili serĉis indicojn pri la sankta budhisma loko –

Ŝambalo – kaj de Majtrejo (la Venonta Budho), kies ĉeesto indikus novan eraon de paco.” (<http://lebendige-ethik.net/engl/4-Wayfarers.html>)

La tuta karavano suferis kelkfoje pro malvarmego (kun neĝo) kaj malsato, ĝi bezonis elporti la danĝerojn de abismoj kaj la atakojn de bestoj kaj homoj. Dum 5 monatoj ĝi estis retenita de la tibeta registaro kaj devigita vivi en tendoj je temperaturoj de ĉirkaŭ 40 gradoj sub nul. Dum tiu periodo estis neniuj kontaktoj kun la ekstera mondo, kaj oni konsideris la karavanon malaperinta. Dum la tuta ekspedicio mortis pluraj ĉevaloj kaj kelkaj homoj.

La aventuro finiĝis en 1928 (do ĝi daŭris 3 jarojn), kaj la familio Roerich setlis en nordokcidenta Hindio, kie ĝi fondis la “Himalajan Instituton pri Esploroj Urusvati” kaj faris esplorojn dum preskaŭ 20 jaroj.

Multo ankoraŭ povus esti dirita pri la kvar Roerich, ekzemple ke Nikolao kreis la Pakton de Roerich (kiu celas pacon per kulturo)

ke li pentris ĉirkaŭ 7000 pentraĵojn
ke Helena kreis la tiel nomatan Agni Jogon,
sed mi volis nur – aŭ ĉefe – paroli pri la aventura vojaĝo de Nikolao, Helena kaj Juri.